

ROMANO PRI LA TRI REGNOJ

DE LUO GUANZHONG
ELĈINIGIS LAŬLUM

Dua volumo



ĈINA FREMDLINGVA ELDONEJO

ROMANO PRI LA TRI REGNOJ

DE LUO GUANZHONG
ELĈINIGIS LAŬLUM

En tri volumoj



Serio “Oriento-Okcidento”

n-ro 44

sub aŭspicioj de la Universala Esperanto-Asocio
en oficialaj rilatoj kun Unesko

ĈINA FREMDLINGVA ELDONEJO
BEIJING ĈIINIO 2008

PRONONCA ŜLOSILO DE LA PROPRAJ NOMOJ EN LA ROMANO

La ĉinaj propraj nomoj latinigitaj laŭ la ĉina oficiala sistemo povas esti prononcataj kiel la Esperantaj kun jenaj esceptoj:

ch = ĉ h = ĥ j = ĝj q = ĉj r = ĵ sh = ŝ w = ŭ x = ŝ y = j
zh = ĝ ai = aj ei = ej ao = aŭ ou = oŭ ia = ja ian = jan ie = je
iao = jaŭ iou = joŭ uo = ŭo uai = ŭaj uei = uj uan = ŭan
uang, wang = ŭang weng = ung yu = ju ŭ kaj u post j, q, x = ju

ENHAVO

Kvardekunua ĉapitro

Liu Xuande transpasas la riveron kun la popolo;
Zhao Zilong sola savas la vivon de la mastrido.....605

Kvardekdua ĉapitro

Zhang Yide hurladas ĉe Changban-Ponto
Xuande malvenkas kaj fuĝas al Han-Rivero.....622

Kvardektria ĉapitro

Kongming debatas lerte kun sudaj oficistoj;
Lu Zijing energie supervenkas la oponentojn.....633

Kvardekkvara ĉapitro

Kongming ekscitas Zhou Yu artifice;
Sun Quan decidas venkbati Cao Cao.....648

Kvardekkvina ĉapitro

Cao Cao perdas militistojn ĉe la Buŝo de Tri Riveroj;
Jiang Gan estas superruzita ĉe l' kunveno de herooj.....663

Kvardeksesa ĉapitro

Per ruzo Kongming prunteprenas sagojn;
Por plan' sekreta Huang Gai torturatas.....679

Kvardeksepa ĉapitro

Sekrete Kan Ze ofertas leteron pri falsa kapitulaco;
Pang Tong liveras planon por kunligi la militŝipojn.....694

Kvardekoka ĉapitro

Festenante sur Jangzi-Rivero Cao Cao ĉantas odon;
Por militiro la armeo norda interligas militŝipojn.....706

Kvardeknaŭa ĉapitro	
Sur la Sepstela Teraso Kongming petas venton; Ĉe l' Buŝo de Tri Riveroj Zhou Yu faras incendion.....	717
Kvindeka ĉapitro	
Zhuge Liang antaŭvidas okazaĵon ĉe la voj' al Huarong; Guan Yunchang liberigas Cao Cao pro l' favoro ricevita.....	733
Kvindekunua ĉapitro	
Cao Ren batalas kontraŭ l' Orienta Wu; Kongming unuafoje indignigas Zhou Yu.....	744
Kvindekdua ĉapitro	
Zhuge Liang saĝe rifuzas la postulon de Lu Zijing; Zhao Zilong per artifiko kaptas urbon Guiyang.....	757
Kvindektria ĉapitro	
Guan Yunchang liberigas Huang Zhong; Sun Quan batalegas kontraŭ Zhang Liao.....	770
Kvindekkvara ĉapitro	
La patrino de Sun Quan pririgardas bofilon en templo; Liu Xuande prenas novedzinon en la nuptoĉambron.....	784
Kvindekkvina ĉapitro	
Xuande incitas Sinjorinon Sun forfuĝi; Kongming iritas duafoje Zhou Gongjin.....	799
Kvindeksesa ĉapitro	
Cao Cao festenas ĉe la Turo de Bronza Birdo; Zhuge Kongming triafoje iritas Zhou Gongjin.....	811
Kvindeksepa ĉapitro	
Dormanta Drako funebras Zhou Yu en Chaisang; Feniksido plenumas oficon ĉe Leiyang-Gubernio.....	825

Kvindekoka ĉapitro	
Ma Mengqi militiras orienten por venĝi la patron;	
Cao Aman tranĉas sian barbon kaj demetas robon.....	844
Kvindeknaŭa ĉapitro	
Xu Chu senvestigas sin por lukti kontraŭ Ma Chao;	
Per ruzo Cao Cao turnas Ma Chao kontraŭ Han Sui.....	859
Sesdeka ĉapitro	
Zhang Yongnian konfuzas Yang Xiu;	
Pang Tong proponas preni Xichuan.....	876
Sesdekunua ĉapitro	
Zhao Yun reprenas A-Dou sur la rivero;	
Sun Quan retirigas Cao Cao per letero.....	898
Sesdekdua ĉapitro	
Por konkuri Fu-Pasejon Yang kaj Gao perdas siajn kapojn;	
Huang kaj Wei konkure faras meritojn en atako al Luo.....	914
Sesdektria ĉapitro	
Dolore Zhuge Liang priploras Pang Tong;	
Komplezeme Zhang Fei liberigas Yan Yan.....	930
Sesdekkvara ĉapitro	
Kongming aranĝas planon por kapti Zhang Ren;	
Yang Fu pruntas armeanojn por venki Ma chao.....	946
Sesdekkvina ĉapitro	
Ma Chao forte atakas Jiameng-Pasejon;	
Liu Bei fariĝas provincestro de Yizhou.....	960
Sesdeksesa ĉapitro	
Guan Yunchang sola ĉeetas festenon de Lu Su;	
Imperiestredzino Fu vivoferas pro la imperio.....	977

Sesdeksepa ĉapitro
 Cao Cao konkeras la teritorion de Hanzhong;
 Zhang Liao superregas la pramejon Xiaoyaojin.....993

Sesdekoka ĉapitro
 Gan Ning kun cent rajdistoj sturmas kampadejon;
 Zuo Ci ĵetas sian pokalon por turmenti Cao Cao.....1008

Sesdeknaŭa ĉapitro
 Laŭ la Libro pri Ŝanĝoj Guan Lu sortodivenas;
 Por puni perfidulon de Han kvin vasaloj mortas.....1022

Sepdeka ĉapitro
 Feroca Zhang Fei ruze prenas Wakou-Pasejon;
 Huang Zhong saĝe prenas Tiandang-Monton.....1037

Sepdekunua ĉapitro
 Freŝforta trupo de Huang Zhong venkas la laculojn;
 Ĉe Hanshui Zhao Yun venkas malamikojn pli multajn.....1052

Sepdekdua ĉapitro
 Zhuge Liang per artifiko kaptas Hanzhong;
 L' armeo de Cao Cao retiriĝas al Yegu-Valo.....1068

Sepdektria ĉapitro
 Liu Xuande fariĝas reĝo de Hanzhong;
 Guan Yunchang sturmas Xiangyang.....1081

Sepdekkvara ĉapitro
 Pang De kun ĉerko iras al la finala batalo;
 Guan Yunchang dronigas la sep armeojn.....1095

Sepdekkvina ĉapitro
 Hua Tuo skrapas venenitan oston de Yunchang;
 Lü Meng sendas alivestitojn trans la riveron.....1108

Sepdeksesa ĉapitro
Xu Huang batalas ĉe rivero Mian;
Lordo Guan fuĝas al Maicheng.....1120

Sepdeksepa ĉapitro
Ĉe Yuquan-Monto aperas la spirito de Lordo Guan
En Luoyang Cao Cao sentas la forton de lia animo.....1134

Sepdekoka ĉapitro
Traktante kapdoloron fama kuracisto mortas;
Post sia lasta ordono la ruza potenculo mortas.....1147

Sepdeknaŭa ĉapitro
Sub premo de la frato Cao Zhi verkas versojn;
La onklon endanĝeriginte Liu Feng punatas.....1160

Okdeka ĉapitro
Cao Pi uzurpe detronigas la imperiestron de Han;
Reĝo de Hanzhong surtroniĝas por daŭrigi Han.....1172

KVARDEKUNUA ĈAPITRO

LIU XUANDE TRANSPASAS LA RIVERON KUN LA POPOLO; ZHAO ZILONG SOLA SAVAS LA VIVON DE LA MASTRIDO

Ĉar Lordo Guan liberigis la baritan fluon en la supra baseno, Zhang Fei kondukis sian trupon sturmi supren kaj baris al Cao Ren la vojon. Li subite renkontis Xu Chu kaj ekbatalis kontraŭ li. Xu Chu ne kuraĝis longte batali kontraŭ li kaj forfuĝis. Zhang Fei lin persekutis kaj renkontis Xuande kaj Kongming kaj ili kuris supren laŭ la rivero. Liu Feng kaj Mi Fang jam pretigis ŝipojn por ili. Ili kune transpasis la riveron kaj sin direktis al Fancheng. Kongming ordonis, ke oni forbruligu la ŝipojn.

*

*

*

Cao Ren kolektis la restantajn soldatojn kaj starigis la trupon en Xinye. Li sendis Cao Hong al Cao Cao por raporti pri la malvenko. Cao Cao koleregis kaj diris: “Kiel la vilaĝano Zhuge Liang kuraĝis tion fari!” Li marŝigis la armeon vaste tra la kamparo kaj kampadis ĉe Xinye. Li ordonis, ke la soldatoj traserĉu la montaron kaj samtempe bloki la Blankan Riveron. Li dividis sian armeon en ok trupojn kaj ili ekmarŝis al Fancheng por ĝin konkeri.

“Je alveno al Xiangyang,” diris Liu Ye, “Via Ĉefministra Ekscelenco unue devas gajni la koron de la popolo. Nun Liu Bei translokiĝis kun la loĝantoj de Xinye al Fancheng. Se nia trupo atakos la du urbojn, ili frakasigos. Prefere sendu homon por kapitulacigi Liu Bei. Eĉ se Liu Bei ne kapitulacos, tamen tio

montros nian amon al la popolo. Se li kapitulacos, do ni akiros Jingzhou sen batalo.”

Cao Cao aprobis lian konsilon kaj demandis: “Kiu iros kiel sendito por tio?”

“Xu Shu estis amiko de Liu Bei,” diris Liu Ye, “kaj nun li estas en la armeo, kial ne sendu lin por tio?”

“Se li iros, mi timas, ke li ne revenos,” diris Cao Cao.

“Se li ne revenos, li estos priridata,” diris Liu Ye. “Ne dubu, Via Ekscelenco.”

Cao Cao alvokis Xu Shu kaj diris al li: “Antaŭe mi intencis niveligi la urbon Fancheng, sed mi kompatas la popolon. Via Moŝto iru persvadi Liu Bei. Se li volonte kapitulacos, mi nuligos lian kulpon kaj donos al li lordan titolon; se ne la popolo kiel la armeo estos buĉita kaj jado kiel ŝtono same detruigōs. Mi scias, ke vi estas lojala kaj honesta, tial mi speciale sendas vin por tio. Bonvole ne vanigu mian esperon.”

Xu Shu akceptis la taskon kaj iris. Veninte al Fancheng, li intervidiĝis kun Xuande kaj Kongming kaj parolis kun ili pri pasintaĵoj.

“Cao Cao sendis min al vi por kapitulacigi vin, celante akiri la koron de la popolo,” diris Xu Shu. “Nun li dividis sian armeon en ok trupojn por marŝi al Fancheng laŭ la Blanka Rivero. Mi timas, ke Fancheng estos nedefendebila; vi devas prepari vin rapide por foriri.”


Xuande deziris reteni Xu Shu. Tiu ĉi diris: “Se mi ne reirus, oni ridus pri mi. Nun mia maljuna patrino jam mortis, mi sentas senliman ĉagrenon. Kvankam mi restos tie, mi ĵuras ke mi neniam faros al li konsilon. Lordo, vi havas Dormantan Drakon por vin asisti, kial do dubi maltrankvile pri sukceso de via afero. Mi petas vian pardonon por mia foriro.”

Xuande ne devigis lin resti.

Xu Shu revenis al Cao Cao kaj diris, ke Xuande ne volas kapitulaci. Cao Cao koleregis kaj tuj komencis militiri en la sama tago.

Xuande demandis Kongming pri kontraŭrimedo.

劉玄德
攜民渡江



“Tuj forlasu Fancheng,” diris Kongming, “kaj prenu Xiangyang kaj restu tie portempe.”

“Sed la popoloj longe nin sekvis,” diris Xuande, “kiel ni povas ilin forlasi?”

“Anoncu al la popoloj,” diris Kongming, “kiuj volas, iru kun ni, kaj kiuj ne volas, restu.” Li antaŭe sendis Yunchang al la bordo de la riverego por pretigi ŝipojn kaj ordonis Sun Qian kaj Jian Yong, ke ili proklamu en la urbo: “La armeo de Cao Cao alvenos, kaj la izolita urbo estas ne longe defendebla. Kiuj el la popoloj volas sekvi nin, do transpasu la riveron kune kun ni.”

La popoloj de la du gubernioj laŭte kriis: “Ni volas sekvi la lordon mortospite!” Ili ekiris plorante. Ili helpis la aĝulojn kaj infanojn kaj kunportante siajn karulojn amase transpasis la riveron kaj ploroj aŭdiĝis ĉe ambaŭ bordoj. Tion vidante, Xuande ploregis en sia ŝipo kaj diris: “Por kio mi vivu plu, se mi kaŭzis tiel grandan katastrofon al la popolo!” Li volis sin dronigi en la rivero, sed la sekvantoj haste lin savis. Informiĝinte pri tio, ĉiuj ploris kordolore. Kiam li atingis la sudan bordon, li returnis sian rigardon kaj vidis, ke popoloj ne transpasintaj la riveron ploradas rigardante al la sudo. Xuande urĝis Yunchang, ke li transportu ilin, kaj surĉevaliĝis nur poste.

Kiam li venis al la orienta pordego de Xiangyang, li vidis ke flirtas flagoj sur la urbomuro kaj ĉe la ĉirkaŭfoso dense staras abatisoj. Xuande haltigis sian ĉevalon kaj laŭte kriis: “Kara nevo Liu Cong, mi deziras nur savi la popolojn. Tuj malfermu la pordegon.”

Aŭdinte ke Xuande alvenas, Liu Cong timis kaj ne eliris. Cai Mao kaj Zhang Yun ascendis la gvatan turon kaj ordonis la soldatojn pafi sagojn malsupren. La popoloj ekster la urbo ploradis rigardante al la gvata turo. Subite iu generalo kun centoj da soldatoj ascendis la turon de la pordego kaj kriegis: “Perfiduloj Cai Mao kaj Zhang Yun! Lordo Liu estas humana bonkorulo kaj deziras savi la popolojn. Kial vi lin rifuzas!”

Ĉiuj direktis al li la rigardon kaj vidis ke li altas je ok futoj, kun jujube ruĝa vizaĝo. Li estis Wei Yan el Yiyang, alnomata

Wenchang. Li hake mortigis kelk¹²² gardistojn, malfermis la pordegon, mallevis la plankon de la levponto kaj kriis: “Imperiestra Onklo Liu, tuj venu en la urbon por kune mortigi la perfidulon!”

Zhang Fei deziris galopigi sian ĉevalon por enrajdi, sed Xuande lin haltigis, dirante: “Ne ĝenu la urbanojn!” Wei Yan vokadis plu la armeon de Xuande eniri en la urbon. Subite iu generalo elrajdis kun trupo kaj kriis: “Simpla soldato Wei Yan, kiel vi kuraĝas ribeli! Ĉu vi konas min ĉefgeneralon Wen Ping!”

Wei Yan koleregis, galopigis sian ĉevalon kun etendita lanco por batali kontraŭ li. Kaj la soldatoj de ambaŭ trupoj batalis kun aerskuaj kriegoj, ĉe la ĉirkaŭfoso.

“Mi deziras protekti la popolon,” diris Xuande, “sed fakte mi ĝin endanĝerigas! Mi ne volas eniri en Xiangyang!”

“Jiangling estas grava urbo strategia,” diris Kongming. “Prefere ni unue prenu Jiangling kaj rezidu tie.”

“Ĝuste tion mi deziras,” diris Xuande.

Sekve li kondukis la popolanojn foriri de la ŝoseo de Xiangyang al Jiangling. Multaj popolanoj fuĝis el Xiangyang dum la ĥaoso kaj sekvis Xuande. Wei Yan bataladis kontraŭ Wen Ping de la lasta horo antaŭ la tagmezo ĝis la unua horo post ĝi, kaj liaj soldatoj ĉiuj viktimiĝis. Wei Yan forfuĝis sur sia ĉevalo sed ne povis trovi Xuande, kaj li sin direktis al Changsha por aliĝi al prefekto Han Xuan.

Iris kun Xuande pli ol cent mil soldatoj kaj popolanoj kun miloj da ĉaroj grandaj kaj malgrandaj kaj sennombraj korboj portataj per vektoj. Kiam ili preterpasis la tombon de Liu Biao, Xuande surgenuiĝis kun la amasoj antaŭ la tombo kaj riverencis al ĝi, dirante kun larmoj: “Via sentalenta kaj senvirta frato Liu Bei vanigis vian konfidon, kaj kulpas nur mi, sed neniom la popolo. Mi petas, ke via animo savu la popolon de Jingzhou!” Lia parolo ĉagrenis kaj kortuŝis la soldatojn kaj popolanojn, ke neniu ne larmis.

Subite skolto alrajdis kaj raportis: “La potenca armeo de Cao

¹²² Kelk uzata kiel numeralo sen finaĵo.

Cao jam kolektiĝis en Fancheng kaj sendis homojn por pretigi ŝipojn kaj bambuajn flosojn por tuj transpasi la riveron kaj nin persekuti.”

La generaloj diris: “Jiangling estas grava punkto strategia kaj ni povas ĝin teni por rezistado. Sed kun dekmiloj da popolanoj povantaj iri ĉiutage nur dek kelk liojn, kiam ni povos atingi Jiangling? Se la armeo de Cao Cao alvenos, kiel ni povos rezisti kontraŭ ĝi? Prefere ni forlasu la popolanojn portempe, kaj iru antaŭe.”

“Por entrepreni grandan aferon,” diris Xuande kun larmoj, “nepre devas dependi de la popolo. Nun la popolo venas kun mi, kial ni ĝin forlasu?”

Tion aŭdinte, ĉiuj popolanoj ĉagreniĝis. Poste iu verkis jenan poemon pri tio:

*En vivdangero li humane zorgis pri l' popolo,
Per liaj larmoj en la ŝip' tuŝiĝis soldatkoroj.
Hodiaŭ je vizito al la enfluej' de Xiangjiang
La maljunuloj tenas Liu ankoraŭ en memoro.*

Xuande iris malrapide kun la popolanoj.

“Baldaŭ alvenos la persekutanta trupo,” diris Kongming, “sendu Yunchang al Jiangxia por peti helpon de Sinjorido Liu Qi, kaj petu ke li tuj veturu kun sia armeo per ŝipoj al Jiangling por nin renkonti.”

Xuande aprobis lian proponon, tuj skribis leteron kaj sendis Yunchang kaj Sun Qian kun ĝi kaj kvincent soldatoj al Jiangxia por peti helpon; kaj li ordonis, ke Zhang Fei komandu la arieron; Zhao Yun protektu la familianojn; kaj ĉiuj aliaj prizorgu la popolanojn en marŝado. Ĉiutage ili iris nur dek kelk liojn.

Cao Cao en Fancheng sendis homon trans la riveron al Xiangyang por alvoki Liu Cong. Liu Cong timis kaj ne kuraĝis iri. Cai Mao kaj Zhang Yun petis lin iri.

“Generalo, vi jam kapitulacis,” diris Wang Wei kaŝe al Liu Cong, “kaj Xuande forfuĝis, certe malstreĉiĝas la singardemo

de Cao Cao. Vi povas prepari vian armeon por surprizatako en strategia punkto kaj vi povos kapti Cao Cao. Pro la kapto de li via prestiĝo skuos la mondon, kvankam la centro de la imperio estas vasta, tiam vi povos ĝin pacigi per dissenditaj dekretoj. Tio ĉi estas rara ŝanco, kiun vi nepre ne preterlasu.”

Liu Cong transdiris lian ideon al Cai Mao kaj tiu ĉi riproĉis Wang Wei: “Vi ne konas la destinton de la Ĉielo, kiel vi kuraĝas diri sensencaĵon!”

“Regnoperfidulo!” kolere insultis Wang Wei, “mi dezirus manĝi vian karnon sen kuiro!”

Cai Mao deziris lin mortigi, Kuai Yue lin deadmonis. Sekve Cai Mao kun Zhang Yun venis al Fancheng por saluti Cao Cao. Cai Mao kaj aliaj parolis kun flatemo kaj mallojaleco.

“Kiom da soldatoj, mono kaj greno nun estas en Jingzhou?” demandis Cao Cao.

“Kvindek mil kavalerianoj,” diris Cai Mao, “cent kvindek mil infanterianoj, okdek mil navigaj soldatoj: entute ducent okdek mil militistoj. La mono kaj greno estas ĉefe en Jiangling; kaj tiuj en aliaj lokoj sufiĉas por bezono por unu jaro.”

“Kiom da militŝipoj?” demandis Cao Cao. “Kiu ilin komandis?”

“Estas pli ol sep mil militŝipoj grandaj kaj malgrandaj. Ili estis sub komando de mi kaj Zhang Yun.”

Kaj Cao Cao nomumis lin Lordo por Pacigi la Sudon kaj Ĉefkomandanto de la Naviga Armeo; kaj li nomumis Zhang Yun Lordo Asistanta kaj Vicĉefkomandanto de la Naviga Armeo. La du viroj tre ĝojis kaj danke riverencis al li.

“Liu Biao jam mortis,” diris Cao Cao, “kaj lia filo Liu Cong kapitulacis. Mi prezentos noton al la Imperiestro por nomumi lin Eterna Estro de Jingzhou.”

La du eliris kun ĝojego.

“Cai Mao kaj Zhang Yun estas flatemaj mallojaluloj,” diris Xun You. “Kial Via Ekscelenco tiel alte ilin honoris per alta lordeco kaj ilin uzas por komandi la navigan armeon?”

“Kiel mi povas ne koni ilin?” diris Cao Cao kun rideto. “Ĉar

la homoj el la nordo sub mia gvido ne scipovas batali surakve, tial mi instalis ilin. Kaj post la sukceso de nia afero, mi ilin traktos laŭmerite.”

Reveninte al Liu Cong, Cai Mao kaj Zhang Yun diris al li: “Cao Cao promesis rekomendi vin al la Imperiestro kiel eternan estron de Jingzhou.”

Liu Cong tre ĝojis. En la sekvanta tago, li kaj Sinjorino Cai kun la sigelilo kaj la armea komanda signo transiris la riveron por bonvenigi Cao Cao. Kaj Cao Cao kun siaj generaloj starigis la trupon ekster la urbo Xiangyang. Cai Mao kaj Zhang Yun ordonis ke la popolanoj de Xiangyang bonvenigu ilin kun brulantaj incensbastonetoj. Cao Cao konsolis ilin per afablaj vortoj. Veninte en la urbon, Cao Cao sidis en sia domo kaj venigis al si Kuai Yue, kaj lin konsolis: “Mi ĝojas ne pro akiro de Jingzhou, sed pro akiro de Yidu.” Kaj li nomumis Kuai Yue Prefekto de Jiangling kaj Lordo de Fancheng. Fu Xun kaj Wang Can estis nomumitaj Lordoj en la Pasejo. Kaj li nomumis Liu Cong prefekto-komandanto de Qingzhou kaj diris, ke li tuj iru al sia posteno.

Informiĝinte pri la ordono, Liu Cong surpriziĝis kaj rifuzis tion dirante: “Mi ne volas fariĝi alta oficisto, sed restadi ĉe la hejmloko de la gepatroj.”

“Qingzhou proksimas al la ĉefurbo,” diris Cao Cao. “Mi volas, ke vi fariĝu kortegano, por ke vi ne estu murdita de aliaj en Jingzhou.”

Liu Cong insiste rifuzis, sed Cao Cao malkonsentis. Devigite, Liu Cong iris kun sia patrino Sinjorino Cai al Qingzhou. Nur lia malnova generalo Wang Wei ilin akompanis kaj ĉiuj aliaj oficistoj ilin akompanis ĝis la pramejo kaj revenis. Cao Cao alvokis Yu Jin kaj diris al li: “Iru kun husaroj por persekuti kaj mortigi Liu Cong kaj lian patrinon, por nuligi la minacon por la estonto.”

Yu Jin akceptis la ordonon, kuratingis ilin kaj kriis: “Mi estas ordonita de la Ĉefministro por persekuti kaj mortigi vin kaj vian patrinon! Frue donu al mi viajn kapojn!”

Sinjorino Cai ploregis ĉirkaŭbrakante Liu Cong. Yu Jin ordonis siajn soldatojn ekagi. Wang Wei indigniĝis, batalis kontraŭ

ili plenenergie kaj estis mortigita de la soldatoj. Armeanoj mortigis Liu Cong kaj Sinjorinon Cai. Yu Jin reiris kaj raportis tion al Cao Cao, kaj tiu ĉi malavare lin premiis. Li sendis homojn al Longzhong por serĉi la edzinon kaj aliajn familianojn de Kongming, sed oni ne sciis, kien ili foriris. – Efektive, antaŭe Kongming jam sendis ilin al loko inter la tri riveroj por rifuĝo. Cao Cao tre bedaŭris pro tio.

Post la konkero de Xiangyang, Xun You konsilis al Cao Cao: “Jiangling abunda je monrimedoj kaj greno estas grava strategia loko de la provinco Jingzhou. Se Liu Bei okupos ĝin, estos malfacile lin ŝanceli rapide.”

“Kiel mi povus tion forgesi!” diris Cao Cao. Sekve li ordonis elekti unu el la generaloj por pionire konduki la armeon. Sed malaperis Wen Ping. Post pridemandado de sendito de Cao Cao, li aperis.

“Kial vi alvenas malfrue?” demandis Cao Cao.

“Estante kortegano,” respondis Wen Ping, “tamen ne povas konservi la teritorion de la mastro, mi vere ĉagreniĝis kaj hontas vidi vin.” Tion dirinte, li eklarmis kun nazmuko.

“Vere lojala vi estas!” diris Cao Cao. Kaj li nomumis lin Prefekto de Jiangxia kaj Lordo en la Pasejo, kaj ordonis lin konduki la armeon kiel pioniro.

Rajdanta skolto raportis: “Kun la popolo sub sia gvido, Liu Bei povas iri ĉiutage nur dek kelk¹²³ liojn, do ili iris entute nur pli ol tricent liojn.”

Cao Cao ordonis, ke la trupoj elektu kvin mil ferkirasajn kavalerianojn por galopi sen ripozo en nokto, kaj kuratingi Liu Bei en diurno. La ĉefa armeo marŝis ilin sekvanse.

*

*

*

Kun cent kelkdek mil popolanoj kaj pli ol tri mil militistoj sub sia gvido, Liu Xuande klopodis moviĝi antaŭen iom post iom al Jiangling. Zhao Yun eskortis la familianojn kaj Zhang Fei protektis la arieron.

“Yunchang iris al Jiangxia, tamen ne resendis informon,” diris

¹²³ Kelk uzata kiel numeralo sen finaĵo.